

# STARTO ★

ORGANO DE ĈEA ESPERANTO-ASOCIO 1974 I (39)

## HONORIGO AL PACAKTIVULOJ

Jam la llan fojon kunsidis la asocia komitato por sia unutaga traktado la 8an de dec.1973 - kune kun la novproponitaj CK-anoj, kun sekcioj kaj invititaj funkciuloj de kelkaj lokaj grupoj.

La kunvenon triste inaŭguris doloriga sciigo pri la forpaso de Tomáš Balda, ĝen.sekretario de MEM. CK ĈEA decidis nomi la forpasanton honora membro de ĈEA "in memoriam"

La kunsido kulminis per solena transdono de la Honor-Insignoj kaj Diplomoj de MEM al jenaj ĉeĝaj esperantistoj : A.Bárochová, J.Hradecký, M.Josková, T.Kilian, D.Kočvara, V.Lorenz, M.Lukáš, J.Mařík, F.Pytloun, ing. F.Sviták, P.Sittauer, J.Vítek kaj J.Vondroušek. Enmanigis ilin al la honorigitoj Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM, kiu haltis en Praha survoje de Varsovio al Budapeŝto. K-do Aleksiev parolis posttagmeze pri la laboro de la MEM-delegitaro ĉe la Packongreso en Moskvo.

Inter la konkludoj faritaj de CK ĈEA oni menciis nur la plej gravajn: CK aprobis raportojn de la prezidanto J.Vítek kaj sekretario Z.Křimský kaj la buĝeton por 1974, komisiis la estraron sekvi la asocian mastrumadon kaj konsentis pri la konstituiĝo de la turisma komisiono kun la prezidanto J.V.Otta. CK plue konsentis ĉesigi surbaze de interkonsento la laborkontrakton kun P.Polnický - antaŭ paso de marto.

En decembro transprenis HI MEM ankaŭ gvidaj funkciuloj de la ĉeĝa pacmovado - neesperantistoj: prof. J.Lukáš, prez. de la Ĉs.Packomitato kaj doc.V.Vyšonlíd, ĝia ĝen.sekretario.

En Slovakio estis aljuĝitaj HI MEM al MUDr.Ľ.Izák, K.Kiss, A.Mahrová, P.Rosa, dr. M.Šaturová, dr.F.Šatura, E.V.Tvarožek, A.Vána kaj ing.M.Zvara.

/k/



N.Aleksiev transdonas le Diplomon al J.Vítek

# FORPASIS T. BALDA

La estraro de ĈEA eldonis tiun ĉi komunikon:

Dolore tuŝitaj ni informas la esperantistojn kaj pacamikojn en la tuta mondo, ke Tomáš Balda, ĝenerala sekretario de MEM, prezidanto de la ĉs. MEM-Sekcio kaj estrarano de ĈEA, estrarano de Ĉeĥa Packonsilantaro, laŭreato de la Ĉs. Pacpremio, de la Honor-Insigno "MEM 1953-1973", senlaca batalanto por monda paco kaj internacia amikeco

forpasis la 8-an de decembro 1973.

La subita morto forprenis lin el inter ni, meze de vigla aktivado, kelkajn horojn antaŭ la momento de solena transdono de Honor-Insignoj,

aljuĝitaj de la IK MEM al meritplenaj batalantoj por la monda paco kaj progreso pere de la internacia lingvo Esperanto. La transdono estis plenumota de li kaj de N. Aleksiev, prezidanto de MEM kaj membro de Monda Packonsilantaro, en la kadro de plenkunsido de la CK ĈEA.

La kunvenintoj, en la ĉeesto de la prezidantoj de tri Esp.-asocioj /la ĉeĥa, slovaka kaj bulgara/, honorigis la memoron de la karmemora kamarado.

Honoron al lia memoro !

Subskribitaj: J. Vítek, Z. Křimský,  
ing. F. Sviták

La Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj "funebros okaze de la morto de k-do T. Balda, kiu faris tre multe por la triumfo de nia movado". La leteron subskribis la resp. sekretario V. Kuznecov. La MEM-sekcio en GDR sendis telegramon, kiu tekstas: "Nian plej profundan kondolencon pro la neatendita dolorega perdo de T. Balda. Ni daŭrigu la laboron en lia spirito!"

Profundan kondolencon pri la morto de T. Balda esprimis la rondetanoj el Hradec Králové, Vsetín k.a. La sekcio IKUE de ĈEA bedaŭras la forpason de la homo, kiu "laboris por la noblaj pacideoj ĝis sia lasta vivmomento".

## Rememoro la plej kara

Kamarado Tomáš Balda ne plu estas inter ni. Per lia forpaso ni perdis signifoplenan, valoran, eminentan esperantiston, kies meritojn ni ankoraŭ ne kapablas pritaksi.

Li ne nur havis vicon da gravaj funkcioj, li ankaŭ ilin kun rara ĝojo plenumadis, li agis, laboregis ĝis la lasta spiro. La fruktodonaĵoj rezultoj de lia persista laboro en la ĝenerala pacmovado estis prave aprezitaj per la "ĈsPacpremio 1970".

Pro la celkonscia, senlaca agado en la funkcio de la ĝenerala sekretario de MEM kaj pro la kampanjo "Ĉs. esperantistoj helpe al la batalanta Vjetnamio" estis al li atribuita okaze de 20-jara jubileo de MEM la Honor-Insigno kun Diplomo de MEM. Pro sia aktivado en la ĉs. Esp.-movado li estis plenrajte nomita Honora Membro de ĈEA.

Li estis samideano, kamarado kaj Homo, da kiaj estas malmulte en niaj vicoj. Bonkora, modesta, sed ne kompromisema, samtempe justa kaj amika, eĉ ofte ĉarme, bonintence ŝercema. Li ofte dum niaj komunaj laboroj subite intermetis ian gajan rakonteton, anekdoton aŭ komikan travivaĵon por refreŝigi la kunlaborantojn.

Per sia laboro restos kamarado Balda en nia memoro kaj vivo ĉiam apud ni.

F. Sviták

Fine de oktobro pasintjara, kiam kulminis la Tutmonda kongreso de pacamaj fortoj en Moskvo, subskribis la ĝenerala sekretario de Tutmonda Packonsilantaro kaj prezidanto de MEM dokumenton, kies graveco por la universala Esperanto-movado estas nedubebla.

Sube aperas la kompleta teksto de la interkonsento. La ĉeĥlingvan version distribuitan al IG ni rekomendas apliki en ĉiuj porpacaj aktivecoj :

## KOMUNA DEKLARO

La Tutmonda Packonsilantaro /TP/ kaj la Internacia Komitato de la Mondpaca Esperantista Movado /MEM/,

celante unuigi ĉiujn sociajn fortojn luktantajn por la paco, konsiderante, ke MEM unuigas multajn milojn da esperantistoj en diversaj landoj, partoprenas la plej gravajn kampanjojn, organizatajn de TP, periode aperigas revuojn PACO kaj PACAKTIVULO, agnoskante, ke la kunlaboro de ambaŭ Movadoj bone servus plifortigon de la paco, plifaciligante kontaktojn inter diverslandaj pacamikoj kaj ilian spert-interŝanĝon,

deklaras, ke ili decidis efektiviĝi reciproke aktivan kunlaboradon, inkluzive la informadon pri siaj aranĝoj kaj atingoj, interŝanĝadon de la konformaj informoj, praktikadi reciproke reprezentadon ĉe internaciaj kongresoj, konferencoj ktp.

TP kaj IK MEM rekomendas al ĉiuj naciaj, provincaj kaj urbaj packomitatoj kaj al ĉiuj naciaj sekcioj de MEM, al ĝiaj grupoj kaj reprezentantoj starigi reciproke, konstantan kontakton, celantan plej vastan uzadon de la internacia helplingvo Esperanto por plifirmigo de iliaj internaciaj rilatoj kaj por altiri esperantistojn en aktivan agadon en la pacorganizaĵoj.

Ni petas ĉiujn Pac- kaj MEM- organizaĵojn informadi nin regule pri siaj aktivecoj.

Komisiite de TP  
Romeŝ Candra  
ĝenerala sekretario

Komisiite de MEM  
Nikola Aleksiev  
prezidanto

## EKSPozICIO EN RIGA

En oktobro-novembro en la muzeo de la eksterlanda arto en Riga estis instalita Internacia ekspozicio de infandeseĝnaĵoj. Ĝiaj vizitantoj povis konatigi kun la atingoj de la malgrandaj artistoj /6-13jaraĝaj/ el 12 landoj. La ekspoziciitaj 132 deseĝnaĵoj estas nur parto de la ampleksa kolekto de A.Kubulniekis, en la 8-jara lernejo en Ziemeri, Latva SSR, kiu sola en Latvio akceptis fakultativan instruadon de la I.L. La tuta kolekto, pli ol 1000 eroj, estas kolektita helpe de Esperanto.

Rigardis ĝin 10 800 personoj el diversaj latvaj regionoj, el Tallinn, Moskvo, Leningrado, Rostock /GDR/. Jen iuj opinioj el la gastlibro :

"... dankon pro la ekspozicio, kiu malkovris puran kaj senperan infanan percepton de la mondo. Precipe ĝi rilatas al la ĉeĥaj deseĝnaĵoj - ili montras diversajn teknikojn kaj eblecojn..."

/La ĉs. ekspoziciaĵoj okupis unu tutan salonon/.

"...Infanoj kaj plenaĝuloj vidas la mondon malsame. Mi volus vivi en tia mondo, kian vidas kaj montras la geknaboj el Francio, Novzelando, Ĉeĥoslovakio kaj aliaj landoj."

En decembro la ekspozicio translokiĝis al Klaipeda /Litova SSR/  
M.Burgmeister, Riga

# Geologia Esperanto

En la tagoj la 6an ĝis la 10an de majo 1974 Varsovio gastigos unikan sciencon simpozion INTERNACIA LINGVO KAJ GEOLOGIO /ILG/. Organizos ĝin Geologia Instituto /Instytut Geologiczny, ul. Rakowiecka 4, 00-975 Warszawa/ kaj Geologia Sekcio de ISAE. La direktoro de IG, prof. Roman Osika, persone aŭspicios tiun ĉi gravan internacian renkontiĝon, kaj lia instituto finance helpos la periodaĵon Geologio Internacia, en kies tria volumo aperos la simpoziaj referatoj. Prof. Osika komunikis al GS de ISAE, ke IG intencas estonte mem eldoni geologian revuon en E-o. Antaŭ nelonge ĝi aperigis esperantlingvan p.k. kun geologia mapo de Pollando.

La Organizan Komitaton de la simpozio konsistigos i.a. :

prof. R. Osika, direktoro de IG /honora prezidanto/ - RNDr. V. Zázvorka, CSc., direktoro de Nacia Muzeo en Prago, prezidanto de GS-ISAE /prezidanto/ - Mgr. S. Smoleński, estro de planado en IG /vicprezidanto/ - Dr. S. Skompski, geologo de IG /ĝenerala sekretario/ - RNDr. J. Kavka, CSc., ĝenerala sekretario de ISAE, sekretario de GS-ISAE, /scienca sekretario/.

En la 1-a cirkulero, kiun IG distribuis al diverslandaj geologiaj institucioj, estas fiksita tiu ĉi programo :

1-a ekskurso : "Sedimentoj kaj formoj de pleistoceno en la centra Pollando" - 6.5.1974

1-a prelegtago : Referatoj kaj komunikaĵoj je la temo "La lingvo-problemo en la geologiaj sciencoj kaj la ĝisnunaj atingoj de Esperanto sur tiu ĉi kampo" - 7.5.1974

2-a prelegtago : Fakaj referatoj samtempe en tri geologiaj sekcioj - 8.5.1974

3-a prelegtago : Referatoj, traktado pri pluaj paŝoj por oficialigi E-on en la geologiaj sferoj, elekto de nova GS-komitato k.a. - 9.5.

2-a ekskurso " "Geologia strukturo de Sanktakruca montaro" - 10.5.

Krom Esperanto, la ĉefa laborlingvo de ILG, estos aplikata nur la pola lingvo - por multnombre partoprenigi polajn geologojn. Prof. Osika prelegos en sia gepatra lingvo pri la lastaj atingoj de la pola geologio. Ĉiuj pollingvaj referatoj estos resumitaj en Esperanto.

J. Kavka

<b>AKTIVECOJ</b>	Februaro/1-3/	Junulara seminario, LG Liberec	
	Aprilo /26-8/	" " " "	
	27	Internacia porpaca marŝo, LG Jablonec	
	Majo	Renkontiĝo sur la monto Kunětice, LG Pardubice	
	<b>DE ĈEA</b>	Julio/5-8/	IIIa kulturfestivalo, LG Opava
		/13.7.- 10.8./	SET Lančov, 2 etapoj, LG Třebíč SET Herbortice
	<b>EN 1974</b>	Aŭgusto/4-18/	Somera kolegio de E-o, LG Liberec
		Septembro/6-8/	Renkontiĝo de filatelistoj, Opava
		/20-22/	Junulara seminario, LG Liberec
		/22-28/	VIIa renkontiĝo en Bedřichov
Oktobro	Renkontiĝo en Mělník		
Novembro/22-24/	Junulara seminario, LG Liberec		

## ĈU GRANDA PROBLEMO ?

Parolante kun funkciuloj de preskaŭ ĉiuj lokaj grupoj de ĈEA oni konstatas, ke inter la klubanoj mankas junularo, eĉ male, oni trovas, ke niaj kluboj ofte estas "kluboj de pensiuloj". Kiamaniere atingi, ke junaj homoj interesiĝu pri Esperanto kaj laboru en niaj lokaj grupoj, en la Junulara sekcio de ĈEA ?

Ni scias, ke la junuloj emas labori en kiu ajn organizaĵo, sed tute alimaniere ol la homoj pli frue naskiĝintaj. La juna homo volas ne nur lerni Esperanton kaj aŭskulti interesajn prelegojn, sed ankaŭ amuziĝi, kanti kaj danci. Li vidas antaŭ si, ke ekposedinte lingvon, li devas gajni per ĝi ian personan profiton. Ne nur finanĉan, sed animan.

Multaj pli maljunetaj homoj kritikis la junularon, ke ĝi ne scipovas fari seriozan laboron. Laŭ miaj spertoj ĉiu, kiu opinias simile, estas tute malprava. La junularo volas serioze labori, sed ni devas helpi ĝin. Nia loka grupo kunlabore kun la Distrikta Komitato de Socialisma Junulara Ligo en Liberec kaj kun la JS de ĈEA, organizis jam sepfoje junularan seminarion. Ni povas diri, ke ĉiuj komplete sukcesis. La unua okazis en januaro 1972 kaj ĝin partoprenis ĉ.20 gejunuloj el 4 urboj kaj la lastan ĉ.40 el proksimume 10 lokoj. Tiuj seminarioj havas grandan propagandan signifon, ĉar ĉiam alvenas gejunuloj, kiuj nur ion aŭdis pri Esperanto kaj neniam antaŭe lernis ĝin. Krome ĉiuj tre interesiĝas pri la venonta seminario.

Kial tiuj ĉi junuloj volas partopreni ilin ? Ne nur pro tio, ke ili /ankaŭ/ amuziĝas, sed ke ili tie ĉiam ekscias ion novan, interkonatiĝas kun novaj amikoj, priparolas laboron en la junulara sekcio. En ĉiu seminario estis envicigita ankaŭ politika prelego. Ekzemple ĉe unu seminario okazinta en la tempo, kiam estis subskribita la kontrakto pri paco en Vjetnamio, la partoprenantoj proponis kolekti monon por restarigo de Vjetnamio. La rezulto estis pli ol 200 Kčs!

Preskaŭ al ĉiu seminario venis kiel gasto iu eksterlanda juna esperantisto, kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne scipovis la lingvon, povis vidi, kiel oni kapablas praktike uzi Esperanton. De tiu ĉi atingo estas nur malgranda paŝo al tio, ke la junulo aŭ junulino aliĝu kiel membro de loka grupo.

Preskaŭ en ĉiu numero de "Starto" oni informis pri la okazintaj seminarioj kaj ankaŭ pri la dato de la venonta. Tamen nur malmulte da lokaj grupoj trovis almenaŭ unu junan homon, kiu povus ĝin partopreni. Preskaŭ ĉiu klubo havas ja iom da mono kaj povus pagi almenaŭ la vojaĝkoston kaj kotizon por la seminariano. Mia opinio ĝi tute ne estus vane elspezita mono.

Niaj seminarioj okazas, bedaŭrinde, nur kelkfoje dum la jaro kaj ni klopodas, ke la junularo laboru la tutan jaron. Pro tio necesas prepari interesan programon por ĉiu kunveno en niaj grupoj. La Esperanta junularo estas diligenta, sed ni devas prepari por ĝi interesan laboron. La junuloj unue helpas kaj poste mem organizos programon laŭ sia vidpunkto.

La unua paŝo, kiel labori kun la junularo estas kunlaboro kun la lokaj grupoj kaj la distriktaj komitatoj de Socialisma Junulara Ligo, inter kies membroj ni certe trovos interesitojn pri Esperanto. Eduko de la gejunuloj estas tasko por nia movado, se ni ne volas morti pro fia malsano, kiu nomiĝas "manko de junularo".

Ladislav Špina

---

KIU EMAS ANIĜI /senpage/ al Klubo de esp.veteranoj, skribu al J.Winter, D 3549, Wolfhagen, Obererstr.8, FRG. La ĉefkondiĉo : 40jara esperantisteco.

# NAŠE ÚKOLY A ODPOVĚDNOST

Ze zkušeností, které jazyková komise ČES během dosavadní činnosti získala, vyšel závažný poznatek, že činnost komise se nemůže omezovat jen na práce v esperantu, ale že je třeba přihlížet téměř ještě více na správnost a čistotu češtiny, ve které se esperantisté obrazejí na veřejnost.

Ve velké míře se objevují texty, články, prospekty, pozvánky a různé oznámení, které se komisi nepředkládají, které prozrazují nedostatečnou znalost jazykovou, a to nejen esperanta, ale i češtiny. Veřejnost takové jevy samozřejmě posuzuje. Jistě není správné tyto posudky nevidět a neslyšet, uzavírat se jim. Ve styku s autory takto kritizovaných prací se ve značné míře objevily myšlenky, že odbornost po stránce lingvistické není důležitá. Ozvaly se i takové hlasy, jakoby esperantisté měli jakýsi dispens ve věcech správné češtiny a jejích norem.

Není novým objevem, že dnes u nás už jsou kulturní a političtí pracovníci, kterým je i esperanto dostupné, kteří dovedou esperantskou práci posuzovat. Je možno setkat se s nimi v kulturních a jiných zařízeních. Nemohou být spokojeni s mnohou esperantskou prací, se všeobecnou úrovní naší práce. Esperantskou prací chápou zcela přirozeně jako vysoce specializovanou vědeckou práci filologickou. Představují si realisticky, že stoupenci, uživatelé a šířitelé esperanta jsou odborníky na jazykovém poli, na kterém povolání ovládají teorii mezinárodního jazykového dorozumění. Toho si nejsme dostatečně vědomi. Neuvědomujeme si vysokou zodpovědnost svého poslání, námi samými často v neopatrné propagandě hlásaného - ani nebezpečí, které může z naší nedostatečné připravenosti vzniknout. Z takové situace může vyvést jen odborné, stupňované vzdělávání, vědecká ukáznenost.

Úkol z toho vyplývající přirozeně nemůže zdolat jen jazyková komise. V ní prozatím pracují jen tři členové. Komisi je zapotřebí silné morální podpory od svazu. Je třeba pevné organizace práce. Agenda komise se značně rozrostla. Jejím aparátu chybí nejen další pracovníci, ale i technické vybavení.

Na konec natno ještě přidat jedno varování. Začlenění jazykové komise nesmí v našem hnutí vést k tomu, aby se ovládnutí jazyka a jazyková odbornost stala výlučnou věcí komise, která jediná by měla tuto stránku v našem hnutí představovat, tak, aby se ostatní esperantisté vůbec nemuseli svou jazykovou úroveň zabývat, spoléhali jen na pomoc komise a mohli dál jen ještě více znalost esperanta zanedbávat a jiným esperanto doporučovat, propagovat - sami se neučit.

Nechť každý soudný esperantista sám uváží, zda nám takové poměry mohou být prospěšné. Nechť se esperantisté nediví, dochází-li k dobře míněným doporučením z řad neesperantské veřejnosti - jak výše zmíněno - nebo někdy k nepochopení našich snah, někdy k ostré kritice nebo i k despektu vůči esperantské práci. /er/

---

Pro kaŭzoj klarigitaj en la n-ro 7/73 p.3-4 la redakcia rondo de STARTO proklamas konkurson por Esp.gejunuloj kun jenaj kondiĉoj :

1. Verku koncizan, strikte alteman konsideron en formo de artikolo /50-60 linioj/ en bona Esperanto kun la temo KIEL VIGLIGI LA INTERESON KAJ AGEMON DE LA JUNULARO EN LA ĈS.ESP.MOVADO.
2. La aĝo de la konkursantoj estu maks.25 jaroj.  
Limdato por la konkurso : 20.4.1974.  
Premioj : 300, 200, 100 Kčs.

## NEOLOGISMOFOBIO KAJ AMATORISMO

La sincera kritiko de neologismoj far "eto" en Starto n-ro 5/1973 estas mistrafo. Se "eto" estas konfuzita per la vortoj agrostido, agapanto ktp., mi demandas, kial li legis tekston el fako, kiun li ne scipovas? Li havu zorgojn malajn, ke ne estu unu aŭ du Esperantoj, sed multaj; ke ĉiu fako havu sian perfektan nomenklaturon. Por atingi tiun ŝtupon ĝi bezonas ankoraŭ multe da neologismoj.

Al /Fx/, kiu en trafa redakcia respondo al "eto" rememoras DUDEN-vortaron kaj la agadon de s-ro Eichholz, mi sciigas, ke s-ro E. ne ĉesigis sian laboron. Presprovaĵe en 500 ekz. aperis preskaŭ duono de la Esperanta Bildvortaro.

La artikolo de K. Piĉ "Por la Zamenhofa Esperanto" /6/73/ vokas alarme kontraŭ lingva naturalismo en lastatempaj tendencoj. Vole-nevole mi subsentas en la pesimismo de K. Piĉ troigadon, ĉar defendante spiriton de la lingvo liamaniere, oni venigus stagnon en la faklingva elkonstruo. Se la direktoj punkte formulitaj en la supre citita artikolo estus tabuo por evoluigi la lingvon, estus preferinde kapitulaci, ĉar Esperanto, kia ĝi estas hodiaŭ, ne estas preta por kontentige servi kiel internacia komunikilo de sciencistoj kaj teknikistoj.

La lingvoevoluo kaj la ekstrecojn ĝuste karakterizas J. Kořínek en 7/73. Mi aldonas nur, ke ŝtopi la truojn en fakaj terminaroj klopodas nur nemultaj homoj. Ekzemple el la tuta Akademio de E-o nur inĝ. A. Broise zorgas pri la afero de teknika vortaro. Mia opinio la Akademio nepre neglektas nuntempe la plej gravan vidpunkton/lingvan/, nome la faklingvan normigon de Esperanto.

Generala konstato: la afero, kiun mi konklude volas kritiki, estas amatorismo en la Esperanto-movado:.. Amatore/=fuŝe/ oni organizas diversajn renkontiĝojn, amatore oni instruas, amatore aranĝas ekspoziciojn, amatore redaktas gazetojn, amatore parolas pri /fak/lingvoj, kaj, kompreneble, "amatore" uzas fakvortojn en ĉiutagaĵoj... Ĉu en la sfero de nia gepatra lingvo iu kuraĝus kritiki fakan terminon ne estante koncerna fakulo?!  
Jan Werner

### ALVOKO AL TEKNIKISTOJ


La Teknika Sekcio de ĈEA alvokas al kunlaboro ĉiujn esperantistojn laborantajn en la tekniko kaj scienco. La nuna laborplano de TS estas direktita al la laŭplana enkonduko de Esperanto en la sciencteknikan praktikon. La plano estas ampleksa, sed la kunlaborantoj malmultaj. Tradukado de diversaj nacilingvaj fakaj artikoloj kaj verkoj, de firmaaj komercaj propagandiloj postulas multe da laboro. Same la prilaborado kaj pliperfektigado de unuopaj terminologiaj sliparoj. Tre grava estas konsultiĝo kun specialistoj en la diskutado pri la novaj fakterminoj. Ekzistas nur nekompleta listo de la laboroj jam faritaj.

La sekcio atendas viajn sugestojn kaj kontribuon por atingi siajn celojn. Membriĝu al TS ĈEA! La aliĝilon kaj necesajn informojn petu ĉe la sekretario. Vian respondon ĝojatendas inĝ. Z. Pluhař, prezidento/5. května 38, 550 Ol, Broumov/ kaj J. Laube, sekretario /Alej Rudé armády 811, 413 Ol Roudnice n.L./

NACIIISMO KAJ INTERNACIA KUNLABORO EN LA NUNTEMPA MONDO estas ĉeftemo de la ĉijara 59a UK de Esperanto en Hamburgo, FRG. - LKK invitis por la kongreso i.a. membrojn de la kvarteto ESPERANTO el Trenčín, kiuj konatigis jam pasintjare en Beogrado.

# Čtenáři píší

(K článku Nad vašimi dopisy)



V roce 1973 jsem požádal o zrušení členství v ČES, objednal jsem si pouze časopis Starto, ale po přečtení článku Z. Křimského jsem se až zalekl, jak nám to autor dává. Proto jsem přehodnotil svoje rozhodnutí a posílám složenkou 48 Kčs. Letos byl u mne na návštěvě přítel z NDR. Moje veškeré znalosti esperanta měly poplach... Při loučení nebylo o slzy nouze. Příští rok je musíme navštívit i kdyby na chleba nebylo. Toto setkání mě tak dojalo, že se vracím zpět do vašich řad.

Josef Provázek, Pelhřimov

Plně uznávám, že nelze snížit předepsané členské příspěvky anebo dokonce omezit se jen na dobrovolné. Je však třeba také zajistit hladký a plynulý přechod peněz k vám. Což kdyby členské známky byly přísně zúčtovatelné jako hotové peníze? Místní skupiny by musely pravidelně předem oznámit potřebu těchto známek podle počtu svých členů a současně zaplatit příslušnou částku, načež teprve by jim objednané členské známky byly zaslány. Inkasování příspěvků od členů by pak bylo výhradně starostí místních skupin - v jejich vlastním zájmu... Dále bych navrhol, aby příspěvky mohly být placeny např. ve čtvrtletních splátkách.

H. Schmidt, Liberec

Opravdu jsem se styděl, když jsem si přečetl článek Nad vašimi dopisy. Místo, které by mělo sloužit závažnějším věcem, musí být obětováno na vysvětlování samozřejmostí, které by měly být jasné každému esperantistovi.

Nebylo by pro naši informovanost lepší, kdyby každý kroužek, který zasílá svůj akční plán svazu, informoval o něm také sousední EK? Pomohlo by to lepší spolupráci všech kroužků v okolí. Větší počet esperantistů na jednotlivých akcích by měl větší propagační účinek, a hlavně mohli bychom koordinovat svou práci a plány.

Jan Kafka, Perštejn n/O.

---

Ohlasy uveřejněné i v posledním loňském čísle Starta dokazují, že jeho zasílání zahraničním čtenářům má svůj význam informační i propagační. Domnívám se, že je více českých odběratelů, kteří by ochotně rozesílali další výtisky svým zahraničním přátelům, kdyby měli možnost objednat si je. Mezi mými dopisovateli projeví o Starto zájem pracovníci z redakce a administrace Internacia Pedagogia Revuo, Germana Kultur-Ligo, představitelé pobaltských esp. klubů aj. Informace ze Starta přepisují také pro slepecký časopis vydávaný v Holandsku.

Karel Kraft, Příbram

## JUNULOJ EN RYNOLTICE

Trideko da junaj esperantistoj el CSR kaj gastoj el GDR kaj Nederlando renkontiĝis en la unuaj tagoj de februaro en Rynoltice, kabanano Ĉerná Louže, distrikto Liberec. La kunveno ĉeestis ankaŭ la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Josef Vitek, kiu informis pri la lastatempaj eventoj en la asocia vivo.

La venonta seminario - la oka - ripetiĝos samloke inter la 26a kaj 28a de aprilo ĉijara.



## SUPER LA PAĜOJ DE STARTO

Leginte la 7an numeron /1973/ de Starto mi sentas min tentata esprimi al tri el la legitaj artikoloj. Tre grava kaj pensiga estas la artikolo de ing. Felix "Pri kelkaj aktualaj problemoj". El ĝi rezultas urĝa instigo al pli profunda ellerno de E-o. Oni ne kredus, kiom multaj el ni regas malbone la lingvon. Ekz. ĵus ricevita letero de esp. aktivulo, kiu havas 20 liniojn, entenas 8 gravajn gramatikajn erarojn: ...pro manko da tempo...ni preparas rekonstruon nian malnovan kabanon...por ke vi povos...Estas do nepre necese, ke la publikigataj tekstoj estu lingve kontrolataj. Multe helpus, se la vico da vere lingve spertaj kreskus, kaj precipe inter la junaj rekruti ĝus jam tiukampe kapablaj homoj.

Aparte pensiga estas ankaŭ observo, ke la nova tempo postulas ankaŭ nuntempajn metodojn. Kiam furoras inter la junaj popularaj kanzonoj, hitkantistoj, bitkapeloj, kiam milionoj da homoj en la mondo sidas ĉe la televidaparatoj, ne havas plu allogon niaj iamaj klubkunvenoj, niaj sloganoj pri utileco de neutrala planlingvo.

Mi volas tuŝi ankoraŭ mian artikolon pri la neologismoj. La redakcio devis koncizigi ĝin kaj ellasi plurajn frazojn. Ĉe tio elfalis ankaŭ sur la paĝo 7 en la unua linio la prepozicio "En..." kaj la frazo per tio iĝis lingve malkorekta. Ĝi tekstu: "En Esperanto ne havas lingvaj tradicio kaj inercio.." Plue, la redakcio aldonis al ĉi mi cititaj ekzemploj de nedezirindaj neologismoj/kindergarteno, Suomio/ ankaŭ la duopon Bohemujo-Ĉeĥio. Mi volus rimarkigi al tio jenon: Post la unua mondmilito por la arkaismiĝinta formo bohemo enkondukigis la vorto ĉeĥo. Bohemio estas kiel geografia formo kaj nomo por unu el la tri ĉeĥaj landoj: Bohemio, Moravio, Silezio, kies loĝantoj estas bohemianoj, moravianoj kaj silezianoj, kiuj ĉiuj kune estas ĉeĥoj. Formon Bohemujo oni konsideras nun arkaisma. Sed Ĉeĥio povas esti konsiderata kiel komuna nomo por la Ĉeĥa Socialisma Respubliko same kiel Slovakio estas nomo por Slovaka Socialisma Respubliko. Do Ĉeĥio estu evitinda kiel sinonimo nur por Bohemio.

Kaj ankoraŭ al la Lingva Konsilanto sur la paĝo 7, verkita de Vuk Echtner, mi volus aldoni rimarkigon. La verba finaĵo "as" tute prave ne plu enuziĝis kiel kurtiga sinonimo por "estas", kiel tion eksperimente uzis Grabowski en sia traduko de Sinjoro Tadeo, kiel tion konstatas la konsultejo de s-ano Echtner. Vere ja la finaĵo -as estas io pli ol nur la k o n s t a t o d e f a k t o entenata en la kopulo estas. Ĉar ekz. "la neĝo blankas" ne nur diras, ke la neĝo estas blanka, sed ke ĝi efikas blanke, ke estas en ĝi certa dinamikeco. Pro tio la modernaj poetoj, i.a. precipe K. Kalocsay, por sia poezia licenca konciziga paralelformo por estas, estis ktp., uzadas 'stas, 'stis, kiu estas pli korekta kaj pli komprenebla formo ol nura "as". Mi vidas fonton de ekuzo de verbigo de adjektivaj kaj adverbaj radikoj, same kiel de substantivaj /gravas taugas, sanas, violonas, aŭtis, instruintis, veturintus ks./, en la gravaj laboroj de niaj elstaraj lingvistoj, precipe de René de Saussure, kiu la unua ellaboris la teorion pri la gramatika karaktero de la Esperanta radiko, kaj poste en la lingvonormigaj laboroj de Kalocsay kaj Waringhien, kiuj en la ampleksa verko Plena Gramatiko de Esperanto sur la principoj de Saussure elkonstruis la valoregan kaj inĝenian sistemon de vortfarado. Ĝi estas kontribuo al vere ekzakta kaj scienca fundamento de plua evoluo de Esperanto.

Jiří Kořínek

---

En PACO /ĉs.n-ro 1/74/ vi legos pri la jubileo de J. Jungmann, pri la heroa laboro de la ĉs. proletoj en la kirgizia stepo, sekvos la porpacan strebado en la ĉeĥa historio kaj kune kun Ŝvejk vizitos la bierejon "U kalicha" en la fragmento de la fama romano de J. Hašek.

La revuo PACO estas abonebla ĉe ĈEA. Jarabono 30 Kčs.

## Rondeta vivo

**B O R**, distr. Tachov - La jarkunveno de LG /15.1./ aprobis la agadplanon por 1974, kiu inkluzivas precipe partoprenon en la konstruata kaj politika aktivecoj de la urbo kaj aparte kunlaboron kun la Distrikta Paĉkonsilantaro okaze de la pacmovada jubilea jaro.

Pluan popularigon de E-o en la ĉelima regiono oni entreprenos kunlabore kun la esp.organizaĵo ITINERO kaj per plivigliĝo de lingvoinstruado. Dauras adaptado de la Esp.-dometo en Bor.

LG aranĝis en la urba kastelo silvestran balon por la publiko. Partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj.

**B R N O** - Primošten, Poezio de J. Wolker, La Proksima Oriento, Muzika renkontiĝo kun B. Smetana - estas kelkaj titoloj de la klubaj vesperoj en la moravia ĉefurbo inter la 1-a de jan. kaj 30a de aprilo ĉijara.

**H A V Í Ř O V** - okaze de la Granda Oktobro okazis solena vespero en la loka kulturdomo. Fragmentojn el Majakovskij kaj aliaj sovetiaj poetoj en E-o deklamis ges-roj Strumínský, Čaplová, Heiser, Novotný. Komponaĵojn el la rusa muziko preparis J. Pastrňáková. La programerojn prezentis s-ro Pastrňák. Fine estis projekciita kolorfilmo "Lando, kiun mi amas".

**J A B L O N E C n.N.** - La 8.12. okazis la jam tradicia Nikolaa vespero. Partoprenis 112 personoj, inter ili invititaj gastoj ankaŭ el GDR /Leipzig, Dresden, Karl-Marx-Stadt kaj Seiffhenedorf - Zittau/.

**O S T R O V n.O.** - Pri Zamenhof prelegis la 20an de dec. J. Kafka. La sekvanta programo estis dediĉita al kontraŭmilitaj kanzonoj far M. Zdravev k.a.

En la jarkunveno oni pritraktis la planon por 1974, ĉefe aŭtunajn kursojn kaj la amikan viziton al GDR.

**P A R D U B I C E** - En oktobro gastis ĉi tie 11 anoj el la ĝemeliĝinta klubo en Berlino. - LG aranĝis la 26an de jan. la IIIan

amuzvesperon en la Kulturdomo.

**P Í S E K** - La lastan verkon de d-ro T. Pumpr "Mesago de la infanoj", prezentitan siatempe en Prago, sub la gvido de M. Juřenová, stencilis la esperantistoj en Písek. Limigita kvanto de ĝiaj kopioj estas ricevebla po 2 Kčs de EK "Laponto" ĉe ZKP Jitex, 397 01 Písek.

**P O D Ě B R A D Y** - Kurson de E-o en Nymburk gvidas nelacigebla F. Pytloun. La tiea librovendejo disvendis pasintjare po 20 lernolibroj de Kilian kaj vortaroj de Hromada.

**P R O S T Ě J O V** - La esperantistoj el Prostějov kaj Olomouc kunveninte la 4an de dec. en Prostějov, starigis la ĉefajn taskojn por siaj agado kaj kunlaboro en 1974. La fundamenta tasko estos gajnadi intereson kaj subtenon de instruistoj precipe en mez- kaj altlernejoj por vastigi la instruadon de E-o helpe de la distrikta komitato de la SJL. La dua tasko estos prepari propagandan instru-ekskursion de lernejoj tra ĈSSR k Hungario kun la helpo de la hungaraj esperantistoj. En la distrikta pionira domo en Prostějov oni instruas nuntempe E-on en du rondetoj.

**T E P L I C E** - Interkonsenton pri reciproka kunlaboro subskribis la Distrikta Biblioteko kaj LG ĈEA. Laŭ ĝi la Esp.fako fondita en la biblioteko estos daŭre kompletigata kaj la literaturo en E-o adekvate vastigata inter la legantoj.

Honoran rekonon pro la popularigado de E-o atribuis al JUDr. Z. Rusín, vicprezidanto de LG, la kultur-fako de la Distrikta Nacia Komitato en Teplice.

**Ú S T Í n.L.** - La jarkunveno de LG /13.12./ elektis la novan komitaton kun la prez. dro V. Novobilský, vicprez. J. Kořínek, sekr. M. Smyčka kaj inĝ. J. Link, inĝ. R. Rychlý kaj A. Šolc kiel membroj

**V S E T Í N** - Varman reeĥon vekis salutletero de LG en Havano, kie la junaj esperantistoj akceptis proponon pri intensa kun-

laboro, petante subtenon precipe per alsendado de gazetoj ks.

**V Y Š K O V** - ER ĉe SZK aranĝos en marto letervesperon. Ĉiujn saluleterojn oni nepre respondos.

**Z N O J M O** - EK ĉe la agrikultura mezlernejo kaj EK ĉe la Kleriga societo aranĝis vesperon omaĝe al L. Zamenhof. Partoprenis 19 esperantistoj, precipe junaj.

### KRONIKO

Sesdekkvinjariĝis la 5an de februaro la prezidanto de la revizia komisiono de ĈEA kaj prezidanto de EK Praha ark. Josef Drlík. Nian elkoran gratulon!

Anežka Prokúpková, longjara membrino de EK Praha, mortis la 17an de jan., aĝa 69 j.

Forpasis post longa malsano Danuše Tancinová, aĝa 46 jarojn, membrino de ER Gottwaldov.

E. Kiliánová, edzino de prof. T. Kilian, forpasis en Třebíč

Honoron al ilia memoro!

### El Pedagogia sekcio

La sindona eldonanto de la IPR L. Pickel forpasis en Nurnbergo al la revuo reaparis en Roterdamo. Ni peros la abonojn.

Renkonte al la 59a UK okazos en Sonnenborg la konferenco de ILEI /17.-26.7./ Restado k mangado por 225 GM. Petu pluajn informojn!

Sekcianoj, ne forgesu sciigi al la sekr. vian poŝtkodnumeron kaj tiel certigi nin pri via deziro pluricevadi informojn pri nia agado. Por membriĝi al ILEI oni devas pagi jarkotizon en egalvaloro de unu guldeno.

INTERNACIAJ KURSOJ kaj seminario por esp. instruistoj okazos en Burgas, Meden Rudnik/aŭg. 1974/. Informas: Okraĵen Esperantski Komitet, bulv. H. Botev 97, Sofio 3.

La vicprezidanto de ILEI J. Ingusz el Budapeŝto transprenis la taskon kolekti informojn pri E.-instruado en lernejoj. Bv. ankaŭ menciis instruanton, klason, gradon,

lernolibron, nombron laŭ la stato de la 15a de nov. 1973.

Ĉiujn demandojn, informojn, sugestojn adresu al la sekretario Karel Kráft, Zdaboř V-28, 261 05 Příbram.

GAZETARA KURSO EN USSR. La junulara ĵurnalo "Leninec" aperanta en Ufa /130 mil ekz./ publikigis 15-lecionan kurson de B. Kolker, vicprezidanto de SEJM. Al sepdeko da personoj la redakcio donis atestojn pri la sukcesa ekzamenigo. Tra la tuta lando oni jam instruas laŭ tiu ĉi lecionaro, tamen libroforma eldono dume ne eblas.

SLOVAKA ANTOLOGIO aperos en 1976, en Slovaka Pedagogia Eldonejo, Bratislava. La verko ampleksos tradukojn el klasicisma, romantisma kaj realisma epokoj de la slovaka literaturo prezentotaj sur pli ol 400 paĝoj.

KIEL ĈIUJARE kunvenos la esperantistoj en kadre de la foiro en Lejpcigo la 9an de marto je la 19a horo en "Klub de Intelligenz", 701 Leipzig, Elserstr. 35

POR LA KOMUNISMAJ CELOJ. La 13an de dec. 73 aperis artikolo en la organo de la Aŭstria KP "Volksstimme", kiu instigas, ke la 22-a Partia Konferenco de KPA diskutu la internaciligvan problemon favore al la komunista mond-movado.

**Korespondi  
deziras**

ESTONA SSR - H. KALAM, lernanto, Musta tee 5 - J. KALJULA, lern., Posti 14-7, H. LOIT, Aidu s/jsk, M. PUUKOL, laboristo, E. MEIESAAR, laboristino, Laane 16, V. OPPO, oficistino, Põhja 2b-6, L. PALU, laboristino, Leola 38-4, H. RAHUMETS, kuracisto, Kivi 5-2, R. SAAG, el.mekan., Jakobsoni 36-1, Ü. UIBO, lern. Side 5-1, P. VAHER, Uueveski 17-4, T. VISNAP, Pioneri 23-3 /ĉiuj el Viljandi rajoon/

ĈSSR - Věra KVASNIČKOVÁ, 28j. oficistino de ĈEA, K Louži 6, 100 00 Praha 10, pri ĉ.t.

# Penko do sekretariátu

UPOZORŇUJEME všechny členy, že sekretariát svazu se přestěhoval do Jilské ul.č.10, Praha 1 / PSC 110 00 Praha 1/.

VŠICHNI VYDAVATELÉ esp.publikací musí mít od 1.1.74 schválenou cenu v tiráži. Jde o přípis Českého cenového úřadu č.839/501/73

ze dne 19.9.73. Pouze odznaky a propagační materiál nepodléhají tomuto nařízení. Obracete se na cenové oddělení ONV příp. KNV:

DĚKUJEME VŠEM, kteří včas poukázali členské příspěvky a tím pomohli svazu ze svízelné finanční situace. Věříme, že i ostatní tak učiní neprodleně, abychom získali dostatek prostředků na zaplacení nových letošních publikací.

ABYCHOM UVEDLI NA PRAVOU MÍRU některé upozornění, která došla v souvislosti se založením organizace pro sběratele esp. odznaků, sdělujeme, že ČES povolil s. Hasalovi, SKN 37,695 03 Hodonín, organizovat zájemce o sbírání těchto odznaků ap. v rámci MS Hodonín, a vydával pro potřeby zájemců oběžník. Jeho činnost je pouze organizační.

ČES IHNED PŘIJME člena svazu /i důchodkyni/ pro různé administrativní práce v sekretariátu. Znalost psaní na stroji vítána. Výhodné platové podmínky !

VŠEM ZÁJEMCŮM O HEROLDO DE ESPERANTO sdělujeme, že na tento rok již nemůžeme přijímat předplatné, nýbrž pouze přihlášky na rok 1975. Zájemce o Norda Prismo upozorňujeme, že jsme dosud nemohli zajistit předplatné, protože vydavatelství NP bylo přemístěno do Finska. Jakmile dosáhneme dohody, vyzveme vás.

TĚM, KTERÍ BYLI VYZVáni, aby ukončili distribuci časopisů, které dosud rozšiřovali, a kteří svazu ještě neodpověděli, sdělujeme, že od 1. ledna 1974 jim toto právo zaniká a další kroky činí pouze na svoji odpovědnost.

DĚKUJEME VŠEM, KTERÍ NÁM PŘÁLI K NOVÉMU ROKU ! Vám i ostatním rovněž hodně zdraví, pevných nervů, obětavosti a porozumění během klidného roku 1974.

ELDONOJ DE "REPORTÁŽ" SERĈATAJ. Kei K u r i s u, konata japana bohemisto-esperantisto delonge kolektas div. ĉeĥajn eldonojn de la libro de J. Fučík "Reportáž psaná na oprátce" por kompara studo. Ĝis nun li kolektis 13. Ili estas : la 1-a eldono /Svoboda/ 1945, 2-a /la sama/ 1946, 5-a /la sama/ 1947, 6-a /la sama/ 1948, 7-a /la sama/ 1948, 19a /SNKLHU/ 1953, 21-a /SNPL/ 1955, 22-a /SPN/ 1955, 25-a /SNPL/ 1960, 26-a /la sama/ 27-a /Odeon/ 1970, 28-a /ĈS/ 1972 kaj la eldono de 1971, la 3-a ĉe SPN. Li bezonas precipe la eldonojn 3-an el 1947, 23-an el 1956 kaj 24-an el 1957. Por ĉiu sendita eldono li rekompencos ekz. per la rakontaro de Miyamoto Masao "Pri arto kaj morto" aŭ "Taglibro de Anne Frank" ks. Sed por preventi ev. duobligon, ges-anoj, kiuj pretas helpi, bv. sin anonci ĉe O. Kníchal /Topolová 2916, 100 00 Praha 10/ antaŭ ol sendi iu/j/n eldono/j/n al K. Kurisu/Mogusa Denti 154-1004, Hino-si, Tokio.

S T A R T O - eldonas ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1. Aperas okfoje jare. Respondeca redaktoro Oldřich Kníchal. Red.komitato : inĝ. E. Felix, J. Mařík, inĝ. F. Sviták. -Dohl. pošta Praha 07, sniž. pošt. popl. pov. ĀP Praha j.z. P/1-2283/1971. Tiu ĉi numero estis transdonita en pres-egon la 20-an de februaro.